


# L' ALVOKO

OFICIALA ORGANO

de la

KEBEKA ESPERANTO-KLUBO

NUMERO 2

Mardon, 12-an de Junio, 1962

## DANKESPRIMOJ

Jen la jarfino rilate al la esperanto-kursoj. Dum tri monatoj ni kune laboris provante lerni la internacian lingvon. Kiel intruisto, mi tute ne hezitas diri, ke la grupo estis enteresa kaj interesata; mi tute ŝatis mian sperton kun ĉiuj el vi kaj mi konservas agrablan memorajon. Kelkfoje mi nevole malpacienciĝis pro trea bruo en la ĉambro sed mi volas senkulpigi min pri ĝi sciante,ke vi facile komprenos la gravecon por instruisto havi silenteman kaj auskulminteman grupon. Ju pli universistatan estas la karaktero de la kurso, des pli bone kaj facile lernas la grupo. Krom tio, mi havas nenion por riproĉi sed multon danki.

Ĉi-jare, Esparanto spertis grandan progreson: tridek personoj lernis esp-on, konstitucio estis preparita por la Kebeka Esperanto-Klubo, Oficiala Organo naskiĝis. Ĉio ĉi efektiviĝis nur sekve de la kunlaborado de ĉiuj el vi kaj sen via helpo nenio estus farebla.

Antau fini, mi ankaŭ volus danki viĉiujn por agrebla plezuro, kiun oni faris al mi ĉe la fino de la kurso. Ĝi tre kortuŝis min ( kaj ankaŭ mian edzinon ) kaj denove, riskante esti ripetema, mi ege dankas vin. Mi nur esperas, ke dum nia foresto vi ne ĉesos praktikadi la lingvon kaj, ke mi havos la plezuron renkonti vin ankoraŭn fojojn dum la venonta jaro.

Sincere kaj amike,

Jacques Gaucher

## ASPEKTOJ DE L'ARTO KANADA

En la artista mondo, Kanado ankoraŭ ne faris grandan bruon. Ĝia kontribuo al la universala arto estas tamen aktuala kaj meritas esti pli konata.

L'arto kanada estas la rezulto kaj la speguliĝo de tri apartaj kulturoj; tiu de tri etnaj grupoj, kiuj unu post la alia okupis la kanadan teritorion, loĝis kaj andoraŭ loĝas en ĝi, ĉiam konservante sian propran tradicion. Tiuj grupoj, laŭ historia sekvenco, estas jenaj: la tiamuloj kanadaj, la francdevenaj kanadanoj kaj la anglodevenaj.

La kanada arto prezentas do al ni senharmoniajn kaj malsamvalorajn verkojn, kie interrilatiĝas la primitiva arto, la manlaborado, la imita aŭ akademia pentroarto kaj ankau belaj provoj por originala esprimo.

Estas neeble fari kompletan inventaron pri moderna kanada arto kaj montri la gravan rolon, kiuj ludis la anglo-kanadaj artistoj en pentrâĵa renoviĝo en Kanado.

La indiĝenoj, kiuj loĝis en Kanado antaŭ la alveno de Cartier, estis plejparte nomadoj kaj ĉasistoj. Ili ofte translokiĝis kaj kunportis kun ili nur minimuman bezonaĵon; liaj artistaj kaj manlaborartaj produktoj estis do tre malmultaj kaj limigitaj je ĉiutagaj objektoj: potaĵoj, armiloj, vestaĵoj, maskoj kaj ornaĵoj. Bedaŭrinde, nuntempe nur restas malmultaj specimenoj.

Inter la idoj de la unuaj kanadaj enloĝantoj, grupoj formiĝis kaj disiĝis tra Kanado. Ekzemple, la ruĝhaŭtuloj el Nord-Ontario longtempe konservis siajn kredojn kaj antaŭajn kutimojn, speciale siajn sekretajn sociojn pri kuracistoj: "socio de maskitaj vizaĝoj". Ili ĉeestis kunsidojn, surhavante maskojn. Tiuj lignaj maskoj prezentas individuajn karakteraĵojn: La vizaĝo estas ĉizita je profundaj faltoj, la okuloj estas ege kavigitaj kaj kelkfoje ĉirkauitaj per metalringo, la naza estas ampleksa, la lipoj dikaj kaj la mentono elstara.Ĉevalharo aŭ kalpajlo utilas, kiel hararo. Ruĝe kaj nigre pentritaj, tiuj maskoj terurigis malbonajn spiritojn kaj forigis malsanon, epidemiojn, ventojn kaj ŝtormojn.

Tiuj maskoj estas maloftaj objektoj ĉar ilin oni produktis en malgranda kvanto kaj konstituas valorplinajn kolektartiklojn por la diletantoj pri arto primitiva.

La arto de la ĉepacifikaj indioj ( i.e. Tlimgits, Haidas, Tsimshians, Kwakiutl, Nootkas ) reprezentas la paroksismon de la primitiva arto kaj eble konstituas la plej originala kontribuo el Kanado al la tutmonda arto.

Tie, la vilaĝoj estis ĉefe norde de la riveretoj aŭ apud la maro. La plej grava el liaj verkoj estas la totemo. Origine, ili estis pli malgrandaj sed per iloj perfektigitaj kaj dank'al la ĉiam pligrandiĝanta propero de la indiaj triboj, ili fariĝis pli kaj pli imponaj laŭ la propero de

ilia proprietulo. Tiujn totemojn oni starigis por la mortintoj aŭ por memorinda okazaĵo aŭ pli ofte por glorigi la virtojn aŭ la grandanimeco de iu familio aŭ grupo. Oni rekonas la familiarajn simbolojn, l'urso, l'aglo, la kastoto, la korvo kaj la lupo. La arto de la indioj el la pacifika marbordo estas karakterizita per la certeco de la metio, la rigora stileco de la dekoraciaj simboloj kaj ĉefe per la abomeno de la malpleno. Ĉiuj spacoj de la surfaco, ĉu skulptita, ĉu pentrita, estas kovritaj de ornamaj motivoj.

Iom pli al nordo, la Eskimaloj minacitaj de malsatego, post kiam ili spertis malfacilaĵojn por vendi siajn fruktojn. Ili prezentis en Europo kaj en Ameriko siam novan arton, kiu posedas la naivacon kaj la freŝan esprimon de la primitivoj.

Kiel ĉiuj novaj landoj de Ameriko, Kanado produktis dum la kolonia periodo verkojn pri pentro, skulptado kaj arkitekturo inspirigitaj de la eŭropeaj modeloj, kiuj mankas originalecon.

La tri lastaj jarcentoj produktis François Ranvoisé , Laurent Amyot, Paul Lambert, François Malepart el Montrealo ( li vivis en Francujo de 1772-ĝis 1780 ) Antoine Plamondon (1804-1895) Zacharie Vincent (1812-1886) ( Portreto de l'Artisto kaj sia filo en la provinca muzeo de Kebeko) James Wilso Morrice (1865-1924) Ozias Leduc, kiunpro la honesto kaj rigoro de sia arto oni komparis al Chardin.

Kun Alfred Pellan, oni eniras la nuntempan periodon . Pellan altiris la atenton de la pariza recenzo en Februaro 1937, kiam li ekspoziciis en la Galerio de la Belaj Artoj, en la Salono de la Junaj Artistoj, kun Gruber, Marchand, Tailler, Humbot, Rohner, Le Moal , k t p.

Li revenis Kanadon dum 1940 kaj li ekspoziciis verkojn ĉefe abstraktajn, kies brilaj koloroj kaj difektaj formoj kreis profundan tumulton en la burĝa societo de Kebeko kaj Montrealo. Lia verko trafis imitindan valoron por la junaj kanadaj artistoj kaj lia influo ludis tre gravan rolon en la renovo de la pentroarto kadaŭa, kie li asertiĝis pro siaj talentoj,kiel koloristo kaj pro sia sento pri pentro.

Disĉiplo de Ozias Leduc, poste influita de Maurice Denis, Paul-Emile Borduas trovis sian vojon admirante la verkon de Pellan kaj legante " Kantoj de Maldoror" de André Breton. Borduas malkaŝas sian internan universon per la aŭtomatista pentro ( kiel la aŭtomatista skribado de André Breton ) elirigante formojn pentritajn laŭ luksega maniero.

En 1945, Borduas fariĝis estro de la automatista movado, kiu en 1948 publikigis " La Entuta Rifuzo " al kiu partoprenas talentoplenaj artistoj, kiel Pierre Gauvreau, J. P. Mousseau, J.P. Riopelle.


Tiuj artistoj deziras batali dekadencan universon kondamnita per siaj serĉoj plastikaj kaj poetaj, vojon de la veroj kaj de perditaj paradizoj.

Borduas sin esprimas per formoj je dispartigo laŭ ritmo malrapida dum Riopelle donas la impreson je eksplodo de krevo. Tre ŝatata de la estro de la movado superrealista, André Breton, oni altigis Riopelle ĉe la unua rango de nunaj avangardaj pentristoj kun Soulages, Atlan, Polyakoff, Wicira, Sylva kaj Nikolas de Stael.

J.P. Lemieux neniam sin helpis per la nefigura vortrezoron. Post kiam li priskibis la kanadajn kutimojn en ornamaj verkoj, li orientiĝis antau nelonge al abstrakta pentrado, kiu pensigas al maturo Stael.

Jean Dallaire jak Jacques de Tonnancour adiciiĝas al la listo de tiuj artistoj, kiuj estas la atestantoj pri aktiveco arta kaj intensa en la grandaj kanadaj urboj. Vasta agrokultura kaj industriplena lando, Kanado povas ankaŭ venki placon en la arta karto de la mondo. Tiuj anglaj aŭ francaj pentristoj ĉerpas el Ameriko kaj Meksiko kierecan komplementon sed estas al Francujo kaj ĉefe al Parizo, ke la plejmulto el la artistoj iras. Parizo ankoraŭ estas la lando de l'Arto kaj de la Belo.

F-ino Hélène Richard.




## RUBRIKO DE KAPROMPILOJ

MALFACILA TRANSVERŜO: Ekzistas pluraj solvoj. La plej mallonga estas verŝajne la ĉi-suba. ( La kruĉo, el kiu ĉiufoje estas elverŝata, estas markita per substreko.)

| 24 Litroj | 13 Litroj | 11 Litroj | 5 Litroj |
|---|---|---|---|
| 24 | 0 | 0 | 0 |
| 11 | 13 | 0 | 0 |
| 11 | 8 | 0 | 5 |
| 16 | 8 | 0 | 0 |
| 16 | 0 | 8 | 0 |
| 3 | 13 | 8 | 0 |
| 3 | 8 | 8 | 5 |
| 8 | 8 | 8 | 0 |

Jen la ĉi-monata problemo

## TRANSLOKIGO




En ĉevalejo havanta sep fakojn staras ses ĉevaloj. Maldekstre tri blankaj, dekstre tri nigraj. La meza fako estas malplena. Poste la nigraj kaj la blankaj ĉevaloj interŝanĝu la lokojn sub jena kondiĉoj: Ĉiu ĉevalo estu kondukata en la sekvantan aŭ postsekvantan fakon, kiu komprenoble devas esti neokupita. Neniu ĉevalo povas esti kondukata returne. Kiel la translokigo estas farebla? Por solvi la problemon, one faru al si la supran desegnaĵon kaj uzu po tri butonojn aŭ ludpecojn de du koloroj.

## FORTIKA STOMAKO

La direkcioj de ĉiuj zoologiaj ĝardenoj penas klarigi al la publiko, ke ne ĉia ajn objekto estas konvena nutraĵo por la bestoj. Precile ĉe la trutoj la homoj ĉiam denove provas la veron de la proverbo, ke la " struta stomako ĉion digestas".

Komprenebla tio ne estas vera, kaj jam ofte tia valora birdo mortis sekve de tiu erara opinio. En la stomako de struto, kiu mortis en la Londona Zoologia Ĝardeno, troviĝis jenaj objektoj: du Manviŝtukoj, tri gantoj, film bobeno de Kodako, dika ŝnuro unu metron longa, fragmento de celuloida kombilo, lignopeco 15 centimetrojn longa, du kolum butonoj, peco de ora kolĉeno kaj ok moneroj. Kiu el tiuj "nutraĵoj mortigis la malfeliĉan beston, ne estis konstateble. La kolekto estas zorge muntita kaj rigardebla en la " Instituto por tropika medicino " en Londono.

Paul Bennemann.



Instruisto: De kiam vi lernas esperanton?

Lernanto: De du semajnoj.

Instruisto: Bone do; montru viajn verkojn.